

# EKO 2023

**Pensu globe  
Agu loke  
Por la landa,  
Fakaj kaj  
Regiona  
Laboro**

**Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komuniko**



**Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj,  
Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj**

**EKO 2023 / 04. Januaro 15, 2023**

**EKO aperas kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK.**

## Kontribuu vi al la centa AMO-seminario!

Jen la proponita temo, kiu estas ege ĝenerala sed tre grava kaj aktuala, kiel decas por jubilea seminario.

### **‘Esperanto aganta en la 21a jarcento’**

Do, klare antaŭen-rigarda temo - kiel ni planu pozitive kaj decide kontribui al la estonteco? Tio postulos por la kontribuantoj la tiel-nomatan ‘blu-ĉielan pensadon’; tio estas plene freŝan aliron al la temaro. Ni proponas aliri la temon sub ses gravaj subtemoj; ne tro multaj sed kovrantaj multon:

- Kulture, literature
- Organize, lande
- Interes-teme, fakte
- Renkontiĝe, kongrese
- Komunike, mesaĝe

Poste, mi donos pli da indikoj por ĉiu ero, prepare al la publika peto por kontribuaĵoj. Gravus sekurigi kaj aperigi kiom eble da kontribuaĵoj eĉ antaŭ la seminario. La centa seminario estos hibrida. Tre gravas la frua arigo de multaj valoraj kontribuoj, el kiel eble plej da mondpartoj kaj perspektivoj. Via kontribuo jam nun bonvenas! Sendu ĝin kun temlinio ‘AMO 100’

## AMO 97 pri la pacifika progreso

Ni alkroĉas la prezentaĵon de Stefan MacGill por la somera kursaro en Melburno, Aŭstralio en la 14-a de januaro. Tio samtempe formis la AMO-seminaron, numeron 97. **Alkroĉu!. Preta.**

## ILEI-kongreso restas alirebla tra januaro

Pliajn tagojn vi havos por aliĝi kontraŭ la plej favoraj prezoj, ĉar la 1-a aliĝperiodo estas plilongigita ĝis la 31a de januaro!

Aliĝu nun ĉe <https://2023.kongreso.org/alighilo.php> kaj ni estu kune en Italio.

## Anglalingva artikolo pri lingvo-planado

Mi ĝojas anonci la publikigon de la libro:

'Epistemological and Theoretical Foundations in Language Policy and Planning' de Michele Gazzola, Federico Gobbo, David Cassels Johnson, Jorge Antonio Leoni de León (2023). Palgrave Macmillan Cham. DOI; <https://doi.org/10.1007/978-3-031-22315-0>.

Ĉi tio estas eta enkonduka libro pri lingvo-politiko por universitataj studentoj. La libro estas la rezulto de somera universitata lernejo pri lingvo-planado kiun Antonio Leoni kaj mi organizis en Kostariko en 2017, danke al la malavara subteno de la universitato de Kostariko kaj la financa helpo de Esperantic Studies Foundation. Esperanto, cetere, estas pritraktata en ĉapitro 4.

Michele Gazzola, Ulster University  
[www.michelegazzola.com](http://www.michelegazzola.com)

## Grava internacia junulara kunveno en Azio

Karaj samideanoj, ĵus fermiĝis la 40-a Komuna Seminario inter Ĉina, Japana, Korea, Vjenama Junularoj, organizita de Ĉina Esperanto-Ligo kaj Zaozhuang-universitato kaj Fremdlingva Eldonejo. Jen la raportoj en ĉinaj amaskomunikiloj:

### EL Popola Ĉinio:

<https://mp.weixin.qq.com/s/Gmgirtxm0BWp0eNqCp5LCw>  
<https://mp.weixin.qq.com/s/kx77QKiSGluTSpwmsp0PCA>  
<https://mp.weixin.qq.com/s/Q6JEbsHoul61jG4I-SZI0q>  
<https://www.facebook.com/%C4%88ina-Esperanto-Ligo-610175949497129/photos/pcb.1557046694810045/1557040344810680>

### Portalo Ĉinio:

[http://news.china.com.cn/2022-12/30/content\\_85033519.htm](http://news.china.com.cn/2022-12/30/content_85033519.htm)

### Pekina Komento :

[http://www.beijingreview.com.cn/wenhua/202212/t20221230\\_800317158.html](http://www.beijingreview.com.cn/wenhua/202212/t20221230_800317158.html)

Ĉina Bildgazeto : [http://www.rmhb.com.cn/qd/202212/t20221230\\_800317150.html](http://www.rmhb.com.cn/qd/202212/t20221230_800317150.html)

### Hodiaŭ en Ĉinio :

[http://www.chinatoday.com.cn/zw2018/ss/202212/t20221230\\_800317156.html](http://www.chinatoday.com.cn/zw2018/ss/202212/t20221230_800317156.html)

### Ĉina Internacia Komunika Grupo:

[http://www.cicg.org.cn/2022-12/30/content\\_42220138.htm](http://www.cicg.org.cn/2022-12/30/content_42220138.htm)

[https://mp.weixin.qq.com/s/2Mf3ZV\\_rllBmdcYPh73Yzq](https://mp.weixin.qq.com/s/2Mf3ZV_rllBmdcYPh73Yzq)

**Azi-Pacifika Centro de CIKG :**

<https://mp.weixin.qq.com/s/SrqRnQDYzloUc7VTTEXkpA>

**China Report ASEAN:**

[https://mp.weixin.qq.com/s/TpblrBsbXT\\_aSkfLVN9sGw](https://mp.weixin.qq.com/s/TpblrBsbXT_aSkfLVN9sGw)

<https://baijiahao.baidu.com/s?id=1753621273834301272&wfr=spider&for=pc>

<https://new.qq.com/rain/a/20221229A092E700>

**El Popola Ĉinio:**

<https://mp.weixin.qq.com/s/4muHj0DH6UwHcNgZAYdXVg>

<https://weibo.com/3427176534/MIYF21P9Q>

<https://new.qq.com/rain/a/20221229A08H5C00>

[https://www.sohu.com/a/622663367\\_121609739](https://www.sohu.com/a/622663367_121609739)

**China Report:**

<http://www.crtv.org.cn/djbd/2022/1229/33039.html>

<https://mp.weixin.qq.com/s/dy6hR57c2UwD3RM00pR8QA>

[https://view.inews.qq.com/wxn/20221229A08DLA00?refer=wx\\_hot&web\\_channel=detail](https://view.inews.qq.com/wxn/20221229A08DLA00?refer=wx_hot&web_channel=detail)

<https://baijiahao.baidu.com/s?id=1753552313300609673>

<https://new.qq.com/rain/a/20221229A08DLA00>

**NetEase**

<https://www.163.com/dy/article/HPPKPQGQ0534J2WK.html>

**Zaozhuang-Universitato:**

<http://www.uzz.edu.cn/info/1023/27292.htm>

[https://mp.weixin.qq.com/s/s\\_4kDpaSXTUiNgHbrp6gWw](https://mp.weixin.qq.com/s/s_4kDpaSXTUiNgHbrp6gWw)

[https://mp.weixin.qq.com/s/YaK1Fc9m\\_0Fxb2uhy-1BUg](https://mp.weixin.qq.com/s/YaK1Fc9m_0Fxb2uhy-1BUg)

<http://ice.uzz.edu.cn/info/1025/1306.htm>

<http://www.uzz.edu.cn/info/1023/27293.htm>

<https://mp.weixin.qq.com/s/79ff0qTtNpY2tEGyvk8MbA>

<https://mp.weixin.qq.com/s/ZPicWdO9skaTGZZ2RwhXbQ>

<https://weibo.com/6430960051/MmrEN7DXX?pagetype=profilefeed>

<http://sie.uzz.edu.cn/info/1023/1208.htm>

<http://sie.uzz.edu.cn/info/1023/1210.htm>

**Fejsbuko de Japano Versio de Pekina Komento:**

<https://www.facebook.com/pekinshuho/posts/pfbid02RqpQvdMMkDzrKNQjY9uykkJEhxz5J3iGpc5j1MPjBfQpPe6DR5zauUjaLEnsnJ9Ql>

**Ĉina.com:**

[https://m.life.china.com/2022-12/30/content\\_176037.html](https://m.life.china.com/2022-12/30/content_176037.html)

**Fejsbuko de Vjetnama Junulara E-Asocio:**

<https://www.facebook.com/photo/?fbid=485428967067335&set=pcb.485430683733830>

Chen Ji, ĈEL

## Israela kongreso aprile

La venonta **Israela Kongreso** okazos en Tiberiado (ĉe la Lago de Galileo) la **13-15.4.2023**. La tradicia postkongresa ekskurso okazos dum aprilo 15-20.

(<https://www.esperanto.org/il/ik.html>). Jam eblas kaj indas aliĝi skribante al [eli@esperanto.org.il](mailto:eli@esperanto.org.il).

## ILEI elstarigas sian kunlaboradon kun FIPLV

Aperis la 2-a retletero de la Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj (Fédération Internationale des Professeurs de Langues Vivantes, FIPLV). Nur la titolo estas la franca. La letero estas en la angla. En ĝi estas artikolo pri prezento de Alessandra Madella “La Nova Ekzameno de la Itala #Esperanto-Instituto: Testado Kapabloj kaj/aŭ Kulturo: <https://fiplv.com/news/fiplv-newsletter/>

## Infana laŭdo el Barato

Inter la 26-a kaj la 28-a de oktobro 2022 okazis ĉe Universitato Anna de Ĉenajo (Chennai), en la suda barata ŝtato Tamil Nadu, la 8-a Internacia Konferenco de Azia



Asocio por Lingva Taksado (AALA), kun la titolo “Klasĉambro-bazata taksado en kaj preter la nova normalo: Defioj kaj ebloj”. La organizantoj akceptis mian prelegon pri la novaj ekzamenoj de Itala Instituto de Esperanto, kiuj estas nun klopodantaj adopti la fokuson pri kompetentoj de la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER). Mi povis, do, partopreni interrete en la tute hibrida konferenco, en kiu mi parolis nome de Zaozhuang-Universitato kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI).

===== vortoj: 650 =====

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikoj estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis majo 2022 (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro de post 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al [stefan.macgill@icloud.com](mailto:stefan.macgill@icloud.com). Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.

RM ene jan 11 GK jan 13